

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon, konklude al nia babilado kun niaj radio-geaŭdantoj, ni menciis kritikojn de sinjoro Günther Becker, UEA-komitatano, pri nia raporto koncerne al la Universala Kongreso en Helsinko.

A.- Unu el tiuj kritikoj de sinjoro Günther Becker koncernis niajn dirojn pri mankoj en la informado koncerne al la esperanto-manifestacioj. En detalega letero li klarigas ĉion, kion faras UEA por informadi la ĵurnalistojn kaj radiojn. Kaj, kiel ni jam sciis, estas multe. Tamen ni konstatas, ke tiu informado ĉefe dependas de la informemo de la ricevantoj, kaj de ilia atendemo.

Cl.- Ni esperas, ke foje alvenos la tago, kiam pere de internaciaj inform-agentoj ĉiuj gazetoj en la mondo estos ĉiutage informataj pri la esperantistaj manifestacioj. Tiam ni ne plu plendos. Sed ni scias, ke tio ne fariĝos tute sola, ĉefe se la esperantistoj ne estas de tempo al tempo iomete informataj pri siaj mankoj.

A.- Sed la ĉefaj kritikoj de sinjoro Günther Becker rilatis al niaj diroj pri la Rezolucio de la Universala Kongreso. Ni legos al vi ambaŭ vidpunktojn. Estas du labor-metodoj. Unu ŝatas diri al teksto pli ol la realeco permesus. La alia ŝatas diri al teksto nur la realecon mem, eĉ se ĝi estas malpli plaĉa.

Cl.- Sinjoro Günther Becker skribas : « *Se mi ne eraras, vi prezentis la Kongreson kiel aranĝon de hazarde kunvenintaj personoj, kies ĉefa tasko estis amuziĝo. Vi malakceptas la nocion **reprezentantoj** en la Kongresa Rezolucio kaj ties verŝajna efiko ĉe la Registaroj. Vi kelkfoje ripetis, ke oni vidu la realaĵon. Verŝajne ankaŭ aliaj kongresanoj estis same impresitaj kiel mi, kiam ili aŭskultis viajn eldirojn pri la laboroj kaj rezolucio de la Kongreso. Multaj el ili laboris dum la tuta semajno, inter ili sufiĉe granda nombro da oficialaj reprezentantoj de la Landaj Asocioj kaj aliaj Esperantistaj instancoj – mi ne volas eĉ menciigi en tiu rilato, ke ĉeestis ankaŭ oficialaj reprezentantoj de registaroj kaj ambasadoj ne nur dum la Solena Inaŭguro, sed ankaŭ dum aliaj partoj de la Kongreso.*

A.- Sinjoro Günther Becker daŭrigas : « *Mi revenu al la Rezolucio. Kiel nia Rezolucio estas aprezata ĉe la diversaj registaroj, ne povas dependi de ni, sed ĉefe de la laboro de niaj landaj asocioj. Alia afero estas, ke certe ni estas tiuj, kiuj almenaŭ provas studi ĉiujn aspektojn de la lingva problemo. Por konstati tion, bonvolu nur studi la artikolojn, kiuj daŭre aperas en plej diversaj Esperanto-gazetoj, aŭ ankoraŭ pli bone la dokumentojn de CED kaj ne laste la tri jam aperintajn kajerojn de **La monda lingvo-problemo**, revuo kiu speciale prilumas tiun aspekton el vidpunktoj, kiujn ni ĝis nun ne plene ekspluatis.* » Fino de la citaĵo el la letero de sinjoro Günther Becker, UEA-komitatano.

Cl.- Niaj diroj, kiel vi aŭdos, neniel malaltigas la laboron de la esperantistoj. Ili nur provas komprenigi, ke oni devus eviti iomete trompi la registarojn. Laŭ la diroj de sinjoro Günther Becker vi komprenis, ke nur parto de la kongresanoj multege laboris, kaj tion ni diris, sed ne ĉiuj, nur parto prezentis societojn aŭ registarojn, ne ĉiuj.

A.- Jen niaj diroj, kiuj tre fidele esprimas nian penson kaj restas aktualaj. Ni citas nin :

Cl.- « El la [...] Rezolucio de la Universala Kongreso ni legas la proponojn : « *La 54-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Helsinko de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1969 en la ĉeesto de 1900 reprezentantoj el 38 landoj, diskutinte la aktualan mondan lingvan situacion en ĉiuj ĝiaj aspektoj proponas al la registaroj de ĉiuj ŝtatoj :*

A.- Unue : Objektive konsideri la nemezureblajn, ĝis nun nespertitajn praktikajn utilojn, kaj la grandegajn moralajn-politikajn, ekonomiajn, psikologiajn kaj aliajn avantaĝojn, kiujn prezentas por ĉiu individuo, ĉiu nacio kaj la homaro kiel tuto, la akcepto de la Internacia Lingvo (Esperanto) kiel neŭtrala instrumento de komunikado por ĉiuj oficialaj kaj neoficialaj internaciaj rilatoj.

Cl.- Due : Entrepreni la necesajn paŝojn por plirapidigi per adekvataj metodoj la procezon de ĝeneraliĝo de la uzo de la Internacia Lingvo en mondaj kadroj precipe per vastigo de ĝia instruado en la lernejoj. »

A.- Kaj ni esprimis nian personan vidpunkton tiel :

Cl.- « Belaj frazoj, ĉu ne ? Sed ĉu vere vi pensas, ke unu sola registaro en la mondo atentis pri ili ? Kaj se oni iom atente ekzamenas ilin, oni eĉ malkovras specon de mensogo. Ĉu vere ni rajtas diri en tia rezolucio :

A.- « *en la ĉeesto de 1900 reprezentantoj el 38 landoj* » ?

Cl.- Jure reprezentantoj ne estas homoj, kiuj mem aliĝas al kongreso, mem pagas ĉion : la vojaĝo, kongreso-kotizo kaj hotel-kostoj. Reprezentantoj estas delegitoj de societoj. Alia mensogeto :

A.- « *diskutinte la aktualan mondan lingvan situacion en ĉiuj ĝiaj aspektoj* ».

Cl.- Ĉu vere 1900 kongresanoj, kiuj renkontiĝas nur unu semajnon por ĉefe turisme viziti urbon, ĉeesti spektaklojn teatrajn, folkloran kaj distrajn, kaj amato partopreni iom improvizitan debaton kaj fest-paroladojn, vere havas la tempon kaj eĉ la deziron diskuti la aktualan mondan lingvan situacion en ĉiuj ĝiaj aspektoj ?

A.- Ni devus havis la kuraĝon vidi la realecon kiel ĝi estas. En Helsinki kongresis 1900 esperantistoj, kaj ili simple proponas al la registaroj sian internacian lingvon. Ili tute ne havis la tempon diskuti pri la aktuala monda lingva situacio, ili cefe amuziĝis.

Cl.- Kaj dum ili amuziĝis delegitoj de la naciaj kaj fakaj societoj kunsidis por diskuti pri la problemoj internaj al UEA kaj al la esperanto-movado. » Fino de la citaĵo el niaj diroj.

A.- Ni esperas, per tiu laŭ ni konstrua kritiko, instigi la verkontojn de nova rezolucio ne diri al teksto pli ol la realeco estas. Ke 1900 esperantistoj grupiĝas, interdiskutas, partoprenas plej diversajn aranĝojn, kaj ke inter ili centoj da reprezentantoj pli atente diskutas la mondlingvajn problemojn, ĉu tio jam ne estas multo ?

Cl.- Kial provi kredigi, ke ĉiuj estis reprezentanto kaj ĉiuj diskutis la aktualan mondan lingvan situacion en ĉiuj ĝiaj aspektoj ?

A.- Jen nia kritiko. Kaj ni estas kontentaj, ke nia samideano Günther Becker ĝin aŭdis, kaj okaze de tiu relego, reaŭdis. Eble tiel en la venonta rezolucio de la Universala Kongreso ne plu aperos troigoj, kiuj povas nur malkontentigi parton de la esperantistoj.

Cl.- Vi aŭdis kronikon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !